# Baldaŭ mortos jaro nuna

Elangligis Montagu C. Butler

Tradicia kimra kanto (aranĝis David Willcocks)




2.
Eble ĝojo kune venos,
Eble multo nin ĉagrenos;
Tamen kun espera koro
Ni salutu ĝin en ĥoro.

3.
Timo pri la estonteco
Estas pura malsaĝeco;
Ĉiu do senzorga estu.
Novan jaron gaje festu.

4.
Super ni ileks-girlandoj
Gaje pendas kun rubandoj,
Ĉar ĉeestas jaran feston
Ni, portante belan veston.

5.
Ĉe l'kamen' kraketas ŝtipoj
Sub la visk' jen kune lipoj!
Nun amatojn ni revidas,
Dancas do, kaj gaje ridas.

6.
Jen la temp' por gejunuloj!
Inter ilin do, kunuloj,
Ĉar la jar' rapide pasas
Kaj vin pli maljunaj lasas.

Music engraving by LilyPond 2.18.2—www.lilypond.org